

67-a jaro n-ro 200 2026:4

la lampiro



Hipatia
Imaga interparolo

18^o Congresso Paulista de ESPERANTO

Esperanto e as relações pessoais na era digital



São José dos Campos

26 - 27 setembro 2026

Hotel Ema Palace

R. Jorge Barbosa Moreira, 70

Mais Informações:
evento.easp.org.br



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**
Almenaŭ varman gratulon
- 5 | **Gratule**
Vivu La Lampiro!
- 6 | **Imaga interparolo kun filozofoj**
Hipatia
- 9 | **Recenzo**
Kie vojoj renkontiĝas
- 11 | **Esplorangulo**
Antaŭ 60 jaroj – la murdo de Manoel Raymundo Soares
- 15 | **Lego-sperto**
Vespera teo kun Zamenhof
- 17 | **Kino kaj aliaj artoj**
Tuŝo
- 18 | **Por iom pripensi**
Kiom valoras Esperanto-revuoj?
- 20 | **Bondezire**
Mesaĝoj ricevitaj pro la 200-a numero de La Lampiro
- 23 | **Rememore**
La lampireto plu flagretas
- 25 | **Iom da gramatiko**
Pri ĉu anstataŭ ĉi tie
- 27 | **El mia vidpunkto**
Sen amo, mi estas nenio, mi scias nenion
- 28 | **Raporte**
En Tesaloniko, Esperanto kiel ŝlosilo de civita identeco

Kovrilbildo: Hipatia, litografajo de la 19-a jarcento. Fonto: Wikimedia



67-a jaro n-ro 200 2026:4

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



La Lampiro esta publikigita laŭ la permesilo
Krea Komunajo CC-BY, krom se en la artikolo
aperas alia indiko.



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José R. Tenorio da Silva

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2026

Simpla Membro	R\$ 200,00
Subtena Membro	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R\$ 100,00
Virtuala Membro	R\$ 50,00

Almenaŭ varman gratulon

Paulo Sergio Viana

Ĉi tiu numero de nia Lampiro havas evidentan apartan signifon: ĝi estas la 200-a! Ĉu tio meritas feston?

Eble niaj legantoj kun pli moderna temperamento opinias, ke ne feston, sed almenaŭ varman gratulon. Persone, mi pensas, ke tiaspeca jubileo estas okazo por ke nia tuta komunumo de parolantoj de Esperanto, en San-Paŭlo, en Brazilo, iom meditu pri nia movado, pri nia kulturo, pri la signifo de Esperantisteco. En ĉi tiu numero mi iom elvolvis kelkajn ideojn pri tio en aparta artikolo.

La Lampiro ekflagris en la jaro 1959. Kaj ĝia pli ol 60-jara vivo ŝuldiĝas

al la sindediĉo de multaj homoj. Ĝi estas ia simbolo de nia Ŝtata Asocio.


Ĉu ĝi ankoraŭ havas la saman valoron kaj prestiĝon kiel ĉe sia komenco? Ĉu ĝi ankoraŭ estas grava kaj apreziata de la samideanaro? Ĉu oni devus ŝanĝi ion en ĝia enhavo, en la moderna tempo? Fine, ĉu ĝi estas ankoraŭ kontentiga legaĵo?

Okaze de la ŝtata kongreso de Esperanto, kiu okazos en la urbo S. José dos Campos, en la proksima monato septembro, estus interese kunsidi kun kafotaso kaj iom interŝanĝi ideojn pri nia heroa Lampiro.

Plumeto

Dirce Sales

Infanlibro **Lancôta** okaze de la
18-a E-Kongreso de Ŝtato Sanpaŭlo





Vivu La Lampiro!

Leandro Abrahão

Ducent numeroj! Respektinda, en-viinda, prikantinda nombro. Kiom da gazetoj atingis tiom? Mi mem estas redaktoro, kiu jam de du jaroj kontentigas sin per kolektado de publikigindaj temoj... Kolektiĝis tiom, ke mi povus tute ne timante elĉerpi la liston disdoni senavare al bezonantaj artikoloj. Tamen, kie ili estas?

Kiam temoj fariĝos artikoloj? Ĝuste tion mi demandas al la Ĉielo. Homo proponas, Dio... mia!

La Lampiro sukcesas lampiri tra la lando sorĉante verkemulojn, tiel ke ĝi povas nun fanfaroni per jubilea nume-

ro. Homoj devus scii, kiel penas redaktoro antaŭ, dum kaj post aperigo de iu numero: Kolektado de kontribuoj, kiuj ne malofte pretiĝas nur post adaj puŝoj fare de la redakcio. Sekvas gustumado de senditaĵoj kaj diskutado kun la aŭtoroj pri komoj tie, sed ne ĉi tie. Harfendado? Ofte ne mankas. Dume horloĝo tiktakas... enpaĝisto prave plendas pri tempopremo. Ni ne forgesu aldoni, ke plurokaze unu kaj la sama ulo kaj redaktas kaj enpaĝigas.

La lasta numero de Konsolanto (organo de Spiritisma Esperanto-Asocio), kiun mi redaktas, postulis kvin monatojn da gut-post-guta, jen esperiga, jen disreviga, jen plezura, jen korprema laborado. La plimulto el la redaktoroj estas volontuloj, kiuj ĵonglas per mil teleroj. Konsolanto mem celis sesmonatan ritmon... sur la kovrilo de la dua numero legeblis "jara apero"... sur la tria... nu, la tria estis la lasta.

Vivu La Lampiro! Gratulon al redaktoroj, artikolisto, estraro de EASP. Bonan legadon al antaj kaj ontaj uloj!





Imaga interparolo kun filozofoj

José Mauro Progiante

Surstrate kun Hipatia, en siaj lastaj tagoj (komence de la jaro 415)

Kiam mi programis mian tempo-maŝinon por vojaĝi al Aleksandrio, mi imagis, ke mi trovos Hipatian en granda biblioteko, ĉirkaŭitan de miloj da skribulaĵoj. Tamen la fama biblioteko de la Ptolemeo jam de longe ne ekzistis en sia iama formo.

Mi trovis ŝin forlasanta lernejon post prelego. Kelkaj lernantoj ankoraŭ sekvis ŝin kaj faris demandojn. Post kiam ili foriris, mi alproksimiĝis.

— Sinjorino Hipatia, mi venas el la dudekunua jarcento kaj ŝatus interparoli kun vi.

Ŝi rigardis min kun pli da scivolemo ol surprizo.

— El la estonteco? Mi supozas, ke vi ne venis por demandi, ĉu mi estas sorĉistino.

— Ne. Kvankam, bedaŭrinde, en via tempo kelkaj homoj jam akuzas vin pri magio.

— Kiam homo ne komprenas instrumenton, kalkulon aŭ ideon, estas facile nomi ĝin magio. Sed bone, vizitanto de la estonteco, faru viajn demandojn. Mi esperas, ke ili estos pli raciaj ol la akuzoj de miaj malamikoj.

— En mia jarcento vi estas memorata kiel filozofo, matematikisto kaj astronomo. Oni ofte nomas vin la unua granda virino en la historio de matematiko. Ĉu vi konsideras vin ĉefe matematikisto aŭ filozofo?

— Tiu distingo ŝajnas al mi stranga. Matematiko instruas la menson ordigi siajn pensojn; astronomio montras la ordon de la kosmo; filozofio demandas, kion tiu ordo signifas. Por mi, ili

estas malsamaj vojoj suprenirantaj la saman monton.

Ni komencis promeni laŭ strato plena de komercistoj, maristoj, soldatoj kaj religiuloj. Aleksandrio ŝajnis enhavi la tutan mondon, sed ankaŭ ĉiujn ĝiajn konfliktojn.

— Vi estas neoplatonisto. Ĉu vi povus klarigi al simpla homo la centran ideon de via filozofio?

— Ni vidas mondon de multnombraj estaĵoj: homoj, bestoj, plantoj, steloj. Sed malantaŭ tiu multeco devas ekzisti unueco, la fonto de ĉio. Ni nomas ĝin la Unuo. Ĝi estas pli alta ol ĉiu aparta estaĵo kaj eĉ pli alta ol tio, kion ordinara lingvo kapablas priskribi.

— Ĉu la homa animo povas atingi tiun Unuon?

— Ne per la piedoj, evidente.

Ŝi ridetis pro sia propra respondo kaj daŭrigis:

— La animo povas proksimiĝi al ĝi per disciplino, intelekta puriĝo kaj kontemplado. Ni devas iom post iom liberigi nin de konfuzo, pasioj kaj falsaj opinioj. Matematiko helpas en tiu vojo, ĉar ĝi devigas la menson turni sin de la ŝanĝiĝemaj objektoj al stabilaj rilatoj.

— Do, kiam vi solvas geometrian problemon, vi ankaŭ praktikas filozofion?

— Jes. Triangulo desegnita sur sablo estas neperfekta, kaj la vento baldaŭ forviŝos ĝin. Sed la menso povas koncepti perfektan triangulon, kiu ne dependas de tiu desegno. Tiel matematiko instruas nin distingi inter tio, kion la okuloj vidas, kaj tio, kion la intelekto komprenas.

— Multaj homoj poste prezentos vin kiel simbolon de la batalo inter scienco kaj religio. Ĉu vi vidas konflikton inter racio kaj religia kredo?

— Mi vidas konflikton inter racio kaj fanatikeco. Tio estas alia afero. Inter miaj lernantoj estas paganoj kaj kristanoj. Sinezio, ekzemple, estis mia disĉiplo kaj poste fariĝis kristana episkopo. Ni ne ĉesis respekti unu la alian.

— Parolante pri tio, ĉu vi renkontis multan reziston pro tio, ke vi estas virino instruanta filozofion al viroj?

— Kompreneble. Sed mi ne petas permeson de antaŭjuĝo antaŭ ol pensi. Kiam mi prelegas pri Platono, Aristotelo aŭ geometrio, la lernantoj baldaŭ forgesas demandojn, ĉu virino rajtas instrui. Ili komencas demandojn, ĉu ili kapablas kompreni.

— Oni diras ankaŭ, ke vi decidis ne edziniĝi kaj dediĉi vian vivon al filozofio.

— Mi elektis sendependecon. Gedzeco povas esti bona por multaj homoj, sed ĝi ne estis mia vojo. Mi ne malestimas la korpon aŭ amon; mi nur ne volas, ke deziro regu mian menson. Filozofo devas lerni regi siajn pasiojn, ĉu li estas viro aŭ virino.

Dum ŝi parolis, ni preterpasis grupon da viroj, kiuj laŭte diskutis pri religio kaj politiko. Mi sciis, kio okazos post nelonge. En marto de tiu sama jaro, fanatika homamaso atakos ŝian veturilon, trenos ŝin en konstruaĵon kaj brutale mortigos ŝin.

Dum kelkaj sekundoj mi ne sciis, ĉu mi rajtas ŝanĝi la historion. Mi povus averti ŝin, peti, ke ŝi forlasu Aleksandron aŭ almenaŭ ne iru sola tra ĝiaj stratoj. Sed ĉu ŝi kredus min? Kaj ĉu savi ŝin ne ŝanĝus nekonatajn partojn de la estonteco? Mi rigardis ŝin, ankoraŭ trankvile parolantan pri racio, kaj decidis silenti. Tiu estis la plej peza silento de ĉiuj miaj vojaĝoj.

La suno jam malleviĝis super Aleksandrio. Mi devis reveni al mia tempo. Antaŭ ol adiaŭi, mi faris la kutiman finan peton:

— Hipatia, bonvolu sendi mesaĝon al la homoj de la dudekunua jarcento.

Ŝi rigardis la ĉielon, kie la unuaj steloj komencis aperi.

— Diru al ili, ke ili ne demandu unue, ĉu ideo venas de viro aŭ virino, pagano aŭ kristano, amiko aŭ mal-amiko. Ili demandu, ĉu ĝi estas vera kaj justa. Kaj avertu ilin: kiam homoj rezignas argumentojn, ili baldaŭ serĉas ŝtonojn. Eduku la racion, sed ankaŭ la karakteron, ĉar inteligenteco sen toleremo povas fariĝi nur pli efika ilo de malamo.

Post tiuj vortoj ŝi foriris, portante sian tabuleton. Mi restis momenton rigardante ŝin malaperi inter la homoj de Aleksandrio, kun la malĝoja certeco, ke mi ĵus interparolis kun virino kapabla mezuri la altojn de la steloj, sed vivanta en mondo ankoraŭ nekapabla mezuri la profundon de sia propra fanatikeco.



Kie vojoj renkontiĝas

Paulo S. Viana

Kie vojoj renkontiĝas

(Finalistaj noveloj de la kvara Interkultura Novelo-Konkurso)

Eldonejo Kava-Pech, 2026.

“Bobelarto” estas unu el la plej gravaj iniciatoj, kiuj lastatempe aperis en la Esperantomovado. Ĝi celas precipe la kultivadon de literaturo, kaj por tio organizas legosalonojn, verkosalonojn, ĉeestajn programerojn okaze de universalaj kongresoj de Esperanto, kaj ankaŭ grandan novelo-konkurson, kiu akceptas verkojn tradukitajn el pluraj lingvoj. De tiuj konkursoj rezultas volumoj de la finalistoj, publikigitaj libroforme.

La nun recenzata libro estas la kolekto de la finalistoj de la kvara novelo-konkurso (jaro 2024). Kiel en ĉiuj antaŭaj, la noveloj devas enhavi temon proponitan anticipe. Ĉi-foje, la temo estas la limoj de artefarita intelekto. Temas fakte pri iaspeca literatu-



ro de “scienco-fikcio”. 28 finalistoj konsistigas la tuton, el kiuj 3 originaloj estas en la itala lingvo, unu en la franca, 6 en la ukraina, 7 en la rusa, 3 en la persa. Do multaj verkistoj el aliaj lingvoj venke partoprenis. Interesa rezulto. La premio iris al kvin verkoj de “spertaj” aŭtoroj kaj al kvin verkoj de “komencantaj” aŭtoroj. Kurioza detalo: multaj noveloj estis tradukitaj al Esperanto per LinguaForce.

Sciencofikcio ne estas facila temo por literaturo. Verkistoj devas zorge eviti tro da teknikaj eksplikoj, tro da “miraklaj” atingoj de robotoj, tro da fantazio rilate la eblecon de teknologio kaj artefarita intelekto. Male, la rakontoj fariĝas tro komplikaj aŭ tro defiaj al la homa imagpovo. Tie kaj tie, ankaŭ en ĉi tiu libro tio okazis. Foje iuj noveloj fariĝis pezaj kaj malfacile sekveblaj. Sed la plej multo konsistigas interesajn historiojn. Multaj prilaboras la eblecon miksi homajn sentojn kun maŝinaj programoj. Nepre rezultas la demando, ĉu iam maŝinoj ja fariĝos homecaj. En unu el la plej interesaj noveloj en ĉi tiu volumo, protagonisto eĉ montriĝas duone homa, duone maŝina. “Malbenita hibrido!” - koleras lia maŝina estro.


Post legado de tia amaso da aventuroj travivitaj inter homoj kaj robotoj, la leganto neeviteble sin turnas al la demandoj: kia estas nia vera naturo homa? kiaj estas niaj sentoj? kia estas nia homa destino sur ĉi tiu mondo? kion signifas “kunsentemo” en la estonteco de la homaro?

Ĉu oni devas pri tio konsulti la artefaritan intelekton?

Tri relanĉoj!

Paulo S. Viana

Facilaj legolibroj
lanĉotaj okaze de la 18-a
E-Kongreso de Ŝtato
Sanpaŭlo



Antaŭ 60 jaroj – la murdo de Manoel Raymundo Soares

Miguel Bento

Ĉi-numere ni devas ne nur festi la fierindan jubileon de *La Lampiro*, sed ankaŭ memori alian kiu, male, estas tute amara.

Antaŭ 60 jaroj, pli precize la 24-an de Aŭgusto 1966, du loĝantoj de la Insulo de la Floroj (*Ilha das Flores*), en Portalegro, trovis kadavron flosantan ĉe la bordo de la rivero Jacuí. Ili tuj vokis la aŭtoritatojn, kaj oni transportis la korpon al kadavrejo. Baldaŭ montriĝis, ke ne temas pri ordinara okazaĵo: la viktimo havis siajn manojn ligitajn surdorse, ne per ŝnuro, sed per lia propra, ŝirita ĉemizo. Ne estis akcidento sed murdo, murdo mistera kaj aparte kruela, kiun la gazetaro komencis nomi La Kazo de la Ligitaj Manoj (*O Caso das Mãos Amarradas*).

Nur kelkajn tagojn poste la viktimo estis identigita: Manoel Raymundo Soares, nur 30-jara. Naskiĝinta en Belém (ŝtato Parao), li en 1953 transloĝiĝis al

Riodejaneiro, serĉe de pli favoraj profesiaj perspektivoj. Tie li aliĝis al la armeo, en kiu baldaŭ evidentiĝis liaj grandaj sindediĉo kaj kompetento, pro kiuj li estis promociita al la rango de dua serĝento. Malgraŭ la humila deveno, Manoel estis ankaŭ eksterordinare klera – li estis avida legemulo kaj aprezanto de klasika muziko, sekvinta kursojn pri tajpado, oratorado... kaj ankaŭ pri Esperanto!

Jam antaŭ la komenco de la diktaturo Manoel politike engaĝiĝis kaj estis grava figuro en la loka movado de serĝentoj kaj subleŭtenantoj, kiuj sindikatece pledis por pli bonaj labor-kondiĉoj, inter aliaj aspiroj (forigo de la bezono peti permeson por edziĝi, pli klara kariera evoluvojo, rajto elektiĝi al la ĉambro de deputitoj kaj al la senato ktp.). Pro tiu agado li en 1963 eĉ estis arestita, kaj poste pune translokita al Campo Grande (similan sorton havis liaj "ribelemaj" kolegoj).

La situacio multe plimalboniĝis baldaŭ post la 1-a de Aprilo 1964: pro lia antaŭa aktivado, kaj pro lia ligiteco al suboficiroj kiuj klopodis organizi kontraŭpuĉon, oni ordonis lian areston. Por eviti la enprizoniĝon, Manoel dizertis kaj komencis vivi kaŝe. Li fine estis formale forpelita de la armeo, kelkajn monatojn poste.

Evidente tia homo, elmetita el sia laborposteno, maldekstre idealisma kaj soifanta je sociaj ŝanĝoj, ne povus fari ion alian ol aliĝi al kontraŭdiktaturaj klopodoj. Kiam tio montriĝis konvena, li vojaĝis al Portalegro – en la sudo troviĝis la geriloj (fakte nur gerilostumpoj) ligitaj al Leonel Brizola, kiu tiam ankoraŭ provis, el sia ekzilejo (Urugvajo), kunordigi ian armitan rezistadon. Tiuj streboj tamen apenaŭ

sukcesis atingi ian minimuman strukturon, kaj rapide fiaskis.

La 11-an de Marto 1966, denunciita de stukaĉo, Manoel estis arestita en Portalegro, ĉe la fama parko Farroupilha. Dum ĉirkaŭ du horoj li estis torturata de la armea polico – fortega bato duonblindigis lin je unu okulo. Tuj poste oni irigis lin al la karcero de la fifama Departamento de Ordo Politiĉa kaj Socia (DOPS). Tie, dum pli ol semajno li preskaŭ ĉiunokte estis longe torturata, per ĉiaspecaj rimedoj – "telefono" (samtempaj frapoj je la tempioj), araostango (*pau de arara*), brulvundado per cigaredoj, elektroŝokoj, piedbatoj... Malgraŭ tioma turmentado, Manoel neniam denunciis siajn kolegojn. Sekve, li estis forsendita al la malliberejo de la Insulo de



Insulo de la Blankaj Ŝtonoj (*Ilha das Pedras Brancas*)

la Blankaj Ŝtonoj (*Ilha das Pedras Brancas*), kie li restis preskaŭ kvin monatojn.

Tiu eta insulo, izolita meze de la lago Guaíba, havas tre surprizan historion, sed tio estas afero por alia artikolo. Mi diru nur, ke tie Manoel ne estis torturita, sed devis vivi en tre malbonaj kondiĉoj kaj, kompreneble, sen kuracado de liaj seriozaj vundoj. Dume, la aŭtoritatoj forneis la provojn pri *habeas corpus* (iniciatitajn de lia edzino Elizabeth), mensoge asertante, ke ekzistas neniu prizonulo kun tiu nomo!

La 13-an de Aŭgusto 1966 Manoel estis revenigita al DOPS. Ne estas tute klare, kio okazis poste, sed estas fakto, ke la policianoj murdis lin. La nekropsio indikis, ke la mortokaŭzo estis drono, kaj, pro la ekzisto de alkoholo en la sango, ke Manoel estis ebria kiam li mortis – sed li estis abstinulo! Neniam oni sukcesis senpolemike konkludi, ĉu okazis planita ekzekuto, aŭ ĉu temis pri akcidento dum torturo (duondronigado, *caldo*).

"La Kazo de la Ligitaj Manoj" okazis en periodo kiam la gazetaro ankoraŭ ne estis plene cenzurata: reportaĵoj pri la afero skandalis la landon, kaj en Suda Riogrando estis kreita Parlamenta Enket-Komisiono (CPI) por esplori la

aferon. Manoel iĝis unu el la unuaj bone konataj viktimoj de la diktaturo, kaj la detaloj de lia misfortuno mal-kaŝiĝis danke al atestoj de aliaj mal-liberigitoj, kaj al la publikigo de la leteroj kiujn li, el la karcero, sendis al sia edzino (kun helpo de anonima(j) provoso(j)). Jardekojn poste Elizabeth finfine sukcesis atingi juran agnoskon pri la respondeco de la ŝtato rilate la morton de ŝia edzo, sed ŝi forpasis antaŭ ol ricevi la verdiktitan monkompenson. Aliflanke, la torturintoj kaj murdintoj, kune kun siaj superuloj, neniam estis punitaj, kvankam ili estis nomitaj en la diversaj enketoj kaj juĝadoj.

Kompreneble, tute ne eblis ĉion rakonti en ĉi tiu supraĵa artikolo: por tiuj, kiuj volas scii pli pri tiu memorenda epizodo de nia historio, la romano de Rafael Guimaraens (*O Sargento, o Marechal e o Faquir*) estas tre rekomendinda.

Laste, sed ne balaste: ĉu ekzistas pli da informoj pri la rilato de Manoel al Esperanto? Ĝis nun mi trovis nur du spurojn. En *Brazila Esperantisto* (n-ro 502-503, jan-feb/1956, p. 14) legeblas lia nomo en listo de ricevintoj de la "norma elementa diploma" de Esperanto. Kaj en *Kooperativismo* (mar/1959, p. 44) mi trovis portugallingvan

tekston de Manoel, akran rebaton de la opinio kiun la verkisto Gustavo Corção estis espriminta pri Esperanto. En tiu teksto, Manoel asertas sin estrarano de iu "modesta Esperanto-organizo" (kiu?). Nu, eble pliaj materialoj plu atendas reeltrovon: mi ankoraŭ ne sukcesis konsulti plenan kolekton de *Kooperativismo*, kaj povas esti, ke ankaŭ alispecaj spuretoj ankoraŭ ekzistas en la arkivoj de Asocio Esperantista de Riodejaneiro kaj de Kultura Kooperativo de Esperantistoj.

Kurioze: ŝajne tiu ĉi estas la unua Esperanto-teksto pri Manoel Raymundo Soares! Nu, prefere malfrue ol neniam!

Bibliografio

- ASSEMBLEIA LEGISLATIVA DO RIO GRANDE DO SUL. **O Caso das Mãos Amarradas** - Relatório da CPI que apurou a morte do sargento do Exército Manoel Raymundo Soares. Porto Alegre, 2011. disponebla en archive.org/details/o_caso_das_maos_amarradas.
- GUIMARAENS, Rafael. **O Sargento, o Marechal e o Faquir**. Porto Alegre: Libretos, 2016.
- **Tortura e Morte do Sargento Manoel Raymundo Soares**. Anonima libreto. disponebla en archive.org/details/tortura_e_morte_do_sargento_manoel_raymundo_soares
- TRIBUNAL REGIONAL FEDERAL DA 4ª REGIÃO (Org.). **O direito na história - O caso das mãos amarradas**. Porto Alegre, 2008.



Manoel Raymundo Soares

Memorial Pessoas Imprescindíveis – skulptaĵo de Cristina Pozzobon en la parko Marinha do Brasil (Portalegro)

Vespera teo kun Zamenhof

Dirce Sales

En decembro 2024 mi ricevis dolĉan inviton de mia kara Paulo Sergio Viana partopreni en alloga projekto: legi ĉiuvespere kelkajn paĝojn da literatura verko tradukita de nia majstro Zamenhof.

Kaj mi ne nur akceptis, sed diris al li, ke al mi plaĉus doni al tiu projekto la titolon Vespera Teo kun Zamenhof, kiu estis aprobita kaj mi eĉ gajnis kajeron, resumojn, komentojn, gramatikajn notojn kaj kreskantan dankegon al la majstro.

Kaj ni komencis per la Biblio el kie ni legis 6 librojn en la Malnova Testamento, nome Jesaja, Rut, Ester, Altaj Kantoj de Salomono, Sentencoj de Salomono kaj Psalmaro.


Sekve ni decidis ŝanĝi la literaturan aspekton de la legaĵoj kaj jen la rezulto: Georgo Dandin, La Revizoro, Hamleto, Anedoktoj en la Fundamenta Krestomatio, La Rabeno de Baĥaraĥ (bedaŭrinde nekompleta verko), La Gimnazio, La Rabistoj, La batalo de l'

vivo, Ifigenio en Taŭrido kaj nuntempe ni finlegas la duan volumon de la Fabeloj de Andersen, kiu enhavas kvar volumojn.

Legi la stilon de Zamenhof egalvaloras realigi plezuran kaj senĉesan superan kurson de Esperanto.

Estas homoj kiuj legas la Biblion ĉiutage. Aliaj preferas ĉiutage legi la Koranon. Ĉiutage avide multaj homoj legas la sociajn retojn. Kaj ni, feliĉe, decidis legi Zamenhof-on ĉiutage!

Imagu al vi ĉiuvespere ricevi la viziton de Zamenhof, trinki ne nur teon kune kun li, sed trinki la simplecon de la majstro, parolante pri la graveco de



Literaturo ne nur kiel lingva instrumento, sed kiel ia fotografio, ia pen-traĵo de iu epoko, de historiaj informoj, politikaj iloj, dramoj, komedioj, gravaj denuncoj, sintenoj de la popoloj antaŭ aŭ post ia milito, paroli pri la Poezio de la vivo, la forto de la Naturo aŭ la sorĉo de la historioj rakontataj multfoje de la propraj entoj kiuj nur pruntepetis la voĉon de la aŭtoroj por ravi nin, por inviti dum momentoj iom forgesi la problemojn, la dolorojn, la batojn de l' sorto, la mokon de l' homoj...

Kiuj estas la avantaĝoj legi ĉion, kion Zamenhof lasis al ni?

Inter pluraj mi elektos du:

Ensorbi la spiriton de Esperanto kaj ĝui intensan stetikan plezuron!

Ni invitas vin fari la samon.

Noto: kiam ni finos tiun legadon, ni transiros al la verkaro de Kabe, se Dio volos!

Koran dankon, Zamenhof!

Kompleta gramatiko de la **tupia lingvo**

Francisco Valdomiro Lorenz

Redaktis:

Fabrizio Possebon | Fernando Pita

Relanĉota okaze de la 18-a E-Kongreso de Ŝtato Sanpaŭlo



Tuŝo

Anna Lobo de Carvalho

Originala Titolo: *Touch (Dramo, Romanco)*

Direktoro: *Baltasar Kormákur*

Aktoroj: *Egill Ólafsson, Pálmi Kormákur,*

Kôki kaj Masahiro Motoki

Lando: *Islando, 2024 - 121min*

La filmo pri kiu mi priparolos ĉi-foje estis indiko de kara amikino mia, Petra. Mi vere dankas al ŝi pro la indiko. Mi decidis spekti ĝin sciante ke ĝi ja estas admirinda filmo. Ĝi nomiĝas “Tuŝo”, kaj ĝi ja estas kiel varma brakumo. Mi pensas ke multaj ĝuos spekti ĝin. Malgraŭ la dramo kaj malĝojo de ĝia historio, mi pensas ke, kiel mi, vi eliros el la filmo kun ĝojo en la koro.

La filmado estas ege bela, kiel ja kutimas por la eŭropaj filmoj. La scenoj kaj pejzaĝoj estas gapigaj. Ankaŭ la aktoroj estas vere bonaj, kiel la aktoroj de juna kaj maljuna kristofer, la juna Miko estas tre bona kaj la aktoro de la patro de Miko, Sro Takahashi, ankaŭ tre bone faras sian rolon. Tiu estas unu el tiaj filmoj kiuj petas trankvilecon kaj silenton – Ĝia ritmo ja ne estas rapida.

En la filmo ni vidas la islanda Kristofer. Jam maljuna. Malbona sanprognozo. Kaj jen la kuracisto diras al li: “Se vi havas ion solvendan en via vivo, profitu por tion fari dum estas tempo”. Sufiĉis por memori al li pri japana amikino el pasinteco, kaj klopodi instigi ŝin retrovi. Oni malkovras ke li havis amrilaton dum iom da tempo, kiam li loĝis en Londono.

Dum tiu esplorado por retrovi la japanan amikinon Miko, oni revizitas ilian pasintecon. Tiam oni vidas kiel ili ekkonis unu la alian, kiel ilia amikeco kreskas en sincera kaj ĉarma amo kaj kiel ili disiĝas. Oni malkovras iom post iom la kialon, la kadron de ilia rilato.

Fine li alvenas al Japanio, serĉe de Miko. Kie ŝi estas? Kiel ŝi fartas? Kial ŝi forlasis lin? Ĉu Kristofer kuraĝos kontakti ŝin? Mi ne multe pli rakontu pri la filmo, ĉar mi vere volas nur instigi vin spekti kaj ĝui tiun ĉarman filmon! Cetero, sciu ke la filmo estas por homoj kun pli ol 16 jaroj, pro kelkaj scenoj kaj temoj. Bonan spektadon kaj ĝis la sekva filmo!

Kiom valoras Esperanto-revuo?

Paulo S. Viana

Okaze de la publikigo de la 200-a numero de nia revuo “La Lampiro”, du pensoj neeviteble venas en la kapon de veterana Esperantisto. La unua estas sento de miro kaj admiro, ke unu el niaj ĉefaj asociaj kulturiloj travivis pli ol sesdek jarojn de honesta, digna, kohera kaj fidela vivo. Ne senvalora medalo por ĉiuj membroj de EASP! Oni povas imagi la longan vicon da zorgoj kaj konstanta laboro, kiun la koncernaj respondeculoj plenumis. Ni ne forgesu, ke dum multaj jaroj nia revuo aperis en papera formato. Ni eĉ ne forgesu, ke nia karmemora EASP-ano Marcos Zlov dum certa tempo persone pagis por la daŭra aperigo de papera Lampiro, kiam la virtuala formato ekfariĝis populara. Fine, venkis la moderna sistemo...

La dua penso estas demando, kiun oni povas adresi al ĉiuj membroj de nia Asocio, eĉ al ĉiuj Esperantistoj en nia lando, eĉ en la mondo: “Kiom valoras kultur-revuo en Esperanto, en la nuntempo?”

Oni povus refari la demandon per aliaj vortoj: “Kian rolon plenumas Esperanta kultur-revuo, nuntempe?” Aŭ: “Kion la Esperantista legataro esperas trovi en kultur-revuo?”

Ĉi tiuj demandoj, en varia formo, dekomence esprimas la variecon de respondoj kaj ideoj. Ili subkomprenigas, ke kulturo estas interesa al la Esperanta publiko – supozeble pri tio neniu dubas.

Sen ia pretendo elĉerpi la temon, mi kuraĝas listigi ĉi-sube kelkajn punktojn, pri kiuj mi persone konjektas:

1. Kultur-revuo povas pensigi la legantojn pri la sociaj problemoj de la koncerna lando. Esperantistoj estu plu neŭtralaj, sed ne indiferentaj al la problemoj, kiuj ĉirkaŭas ilin kaj la ceteran loĝantaron. Jen devo de civitaneco.

2. Kultur-revuo povas kontribui al edukado, kiu estas esenca faktoro por progeso de nia mondo. Ĉiu homo havas la moralan devon edukiĝi kaj kleriĝi, por ke lia kunvivado kun aliuloj

estu pli homeca. Lernado estas tasko por la tuta vivo!

3. Kultur-revuo povas faciligi la posedon de pli alta nivelo en la uzado de nia lingvo. Lernado de lingvo neniam tute kompletigas: oni lernas dum la tuta vivo. Legado kaj meditado pri la tekstoj certe kontribuas al pli riĉa uzado de la lingvo.

4. Kultur-revuo en Esperanto estas la plej ĝusta respondo al tiu abomena antaŭjuĝo – bedaŭrinde ankoraŭ ofte trovata en la mondo – ke Esperanto ne havas kulturon. Kulturon oni povas montri ne nur per niaj libroj, niaj Esperanto-kongresoj, niaj kulturaj kunsidoj, sed ankaŭ per niaj revuoj.

5. Kultur-revuo povas ricevi kontribuojn de homoj el la tuta mondo. Aziano povas sendi al ĝi sian tekston pri lokaj aspektoj; afrikano pri siaj tipaj travivaĵoj; eŭropano kaj oceaniano pri siaj spertoj, kiujn alilokanoj ne konas. Ĉu ne tia estas la celo de Internacia Lingvo? Ĉu ne tia estas la ampleksa

kompreno pri la koncepto “solidareco”?

6. Kultur-revuo estas potenca rimedo por pliiĝo de toleremo en la socio. Vere klera homo estas tiu, kiu neniam spitas aliulan opinion, sed ĉiam malfermiĝas al aŭskultado, eĉ se li ne konsentas kun la diraĵoj. Neniu komplete pravas, neniu komplet malpravas. Kulturo estas provado serĉi la veron, kiu konstante fuĝas.

7. Kultur-revuo stimulas la homojn verki kaj esprimi siajn opiniojn kaj sentojn pri la mondo. Ĝi estas demokratia ilo, ĉar ĝi malfermas siajn paĝojn al diverseco kaj malsameco. Ĉiu homo povas kontribui, ne nur “intelektuloj” kaj “saĝuloj”. Sen etikadoj!

Eble mi povus listigi pliajn punktojn, sed preferinde mi lasu la kompletigon de ĉi tiu listo al la legantoj mem. Oni povus diri, ke unu plia tasko de kultur-revuo estas... provoki la legantojn!



Dramo en la urbo de la legendoj

J. M. Progiante

Infanlibro

lanĉota okaze de la 18-a
E-Kongreso de Ŝtato Sanpaŭlo



Mesaĝoj ricevitaĵ pro la 200-a numero de La Lampiro

Ni homoj estas strangaj bestoj: ni povas kalkuli. Kaj el la plej elementa kalkulkapablo ni komencis respondi "kiom da fruktoj nia grupo en kaverno kolektis kaj dividos?", "kiom da bestoj ni ĉasis aŭ bredas?", "kiom for estas nia vojo ĝis la plej proksima akvofonto?", "kiom da steloj vi vidas en la ĉielo?" (por ne paroli pri demandoj kiel "kiom da ŝtonoj ni bezonas por buĉi la alian homgrupon?"). Kalkulon post kalkulo ni alvenis al la spaco kaj havas la sondilon "Voyager" 26 miliardojn da kilometroj for de la Tero, post 50 jaroj en seninterrompa vojaĝo (nu, ne tiel for, ĉar tiu distanco egalas al nur 1 "lumtago", en spaco kie ĉio kalkuliĝas je multaj lumjaroj!). Ĉar kalkulado ne ĉiam estas plaĉa tasko, ni ŝatas kaj reliefigas la t.n. "rondajn" ciferojn: 10, 50, 100, 500, 1000... Mi hipotezas, ke kiam nombro reprezentigas per finajnulojn, tiu rondeco komforte ripozigas niajn mensojn, kiel plaĉa kuseno sub

niaj kapoj. Kiu trankvile dormus kun sia kapo sur akraĵo kiel "17513"? Nur fakiroj festus ion kalkulitan laŭ 111 111 tagoj (~304 jaroj). Tiel mi jubile salutas ĉi tiun bele rondan, jubilean numeron de "La Lampiro", kun eĉ du rondaj numeroj, 200! Gratulon al ĉiuj, kiuj verkis, kolektis, redaktis, aranĝis, presigis, kunportis al poŝtoŝicejo, fizike aŭ rete ĝin dissendis tra la jaroj... Apartan gratulon al d-ro Paŭlo Sérgio Viana kaj al José Roberto Tenório, kiuj de tiom da numeroj zorge altnivele kunmetas plaĉan kaj legindan enhavon. Se ĝi ne estus lampiro, mi nomus ĝin lumturo. Kiom da interesaj kaj klerigaj paĝoj ni trovis en tiu serio tra la jardekoj!... Kiom da lernitaj faktoj, pensigaj opinioj! Kiom da frandindaj numeroj atingos nin en la estonteco, se vi bonvoleme verkos por la revuo?... Nekalkuleble.

James Rezende Piton, Paulinia-SP

Laŭ mi, la revuo La Lampiro estas tre grava kaj fidinda informfonto, ĉar per ĝi mi povas pli bone kompreni Esperantujon kaj plibonigi mian legkapablon pere de artikoloj pri aktualaj temoj kaj novaĵoj.

Fabjo Silva, Použalegro-MG

Nome de Literatura Vivo, mi elkore gratulas la aperon de la 200-a numero de La Lampiro. Dum pli ol ses jardekoj La Lampiro akompanis la historion de la brazila Esperanto-movado. Ĝi travivis ŝanĝigojn, interrompojn kaj renaskigojn, sed neniam perdis sian celon: kunigi esperantistojn, disvastigi kulturon kaj konservi la spiriton de internacia amikeco. Tiu persisto faras ĝin ne nur revuo, sed ankaŭ valora historia dokumento de la movado en Brazilo.

La apero de la 200-a numero estas atesto pri la sindediĉo de multaj redaktoroj, aŭtoroj kaj kunlaborantoj, kiuj dum jardekoj gardis la flamon de ĉi tiu revuo. Danke al ilia laboro, La Lampiro fariĝis fonto de informoj, inspiro kaj kultura vivo por generacioj da legantoj.

Ni deziras al La Lampiro ankoraŭ multajn sukcesajn jardekojn, abundon da talentaj aŭtoroj kaj ĉiam novajn legan-

tojn. Ĝia lumo daŭre brilu tra Brazilo kaj trans ĝiaj landlimoj, inspirante novajn generaciojn de esperantistoj.

John Huang, Kun-Ĉefredaktoro
Literatura Vivo

Mi elkore gratulas pro la apero de la 200-a numero de Lampiro! Tiu ĉi jubileo estas bela pruvo de la persista laboro kaj sindediĉo de ĉiuj, kiuj dum la jaroj kontribuis al la revuo. Lampiro estas grava ponto inter esperantistoj, fonto de informoj, kulturo kaj amikeco. Mi deziras al la revuo ankoraŭ multajn sukcesajn jarojn kaj multajn novajn legantojn! Kore,

Erika Godó, Fondinto kaj
ĉefredaktoro de Literatura Vivo

La atingon de la numero 200 de "Lampiro" indas celebri. Ĝi estas signifa atingo, kiu meritas la aplaŭdojn de la tuta Esperanta Movado, ĉar ĝi atestas la seriozecon, respondecon kaj disciplinon de ĝiaj organizantoj. Nome de Eldonejo Lorenz ni esprimas niajn plej korajn gratulojn! Ke venu pliaj 200!

Eldonejo Lorenz

“Dum la naturaj lampiroj bedaŭrinde malaperas, nia kara plurmense arte-

farita Lampiro atingas sian 200-an numeron, ankoraŭ brilante forte, disvastigante kulturon kaj scion per Esperanto. Koran dankon, pro tio, al la nunaj kaj antaŭaj gvidantoj de EASP kaj redaktoroj!”

José Mauro Progiante, *Bauru-SP*

Gratulon pro tiu mirinda laboro.

Ladislau Afonso, *el Minas Gerais.*

Gratulon pro la 200-a eldono de Lampiro! Por mi, ĝi estas tre grava kaj kultura revuo de la Esperanta Asocio de São Paulo, kiu havas longan historion. Ĝiaj eldonoj ja estas trezoroj de esperanta movado. Mi esperas ankoraŭ pliaj eldonoj kaj ke ĝi atingu pli da homoj!

Anna Lobo de Carvalho

Al vidinda La Lampiro
Okaze l’ jubileo ĝia
Mi nun dankas kun sopiro
al tiu revuo historia

Daniely Silva

La 1an de aŭgusto 2026

De 1959 ĝis nun kiom da ŝanĝoj okazis en la mondo, sed La Lampiro plu tenas la saman kvaliton, respekton kaj fidelecon al siaj legantoj.

Dirce Sales, *Rio*

Kun granda ĝojo ni festas la 200-an eldonon de Lampiro, revuo kiu dum multaj jaroj lumigis la vojon de la esperantistoj en Brazilo. Ĝi ne estas nur kolekto de artikoloj, sed ankaŭ ponto inter amikoj, kulturoj kaj idealoj. Dank' al la sindediĉo de ĝiaj redaktoroj, verkistoj kaj legantoj, Lampiro fariĝis simbolo de unueco kaj konstanta laboro por Esperanto en nia lando.

Ni deziras, ke ĝia lumo daŭre brilu tra multaj estontaj eldonoj, inspirante novajn generaciojn de brazilaj esperantistoj.

Gratulon pro la 200-a eldono! Vivu Lampiro! Vivu Esperanto!

Joe Basílio





REMEMORE

La lampireto plu flagretas

Ekesto

La organo de EASP, La Lampiro, estas unu el plej longdaŭraj esperantaj periodaĵoj en Brazilo.

Ĝia unua numero aperis en 1959 sub la zorgo de la junulo Darcy Pedroso Machado Gaia, kiu tiel aranĝis la eldonajn taskojn:

(Nerespondeca) Direktoro: DPMG

Redaktoro: Darcy

Kompilisto: Pedroso

Tajpisto: Machado

Aranĝisto: Gaia

Krome en tiu epoko la redaktoro ŝajne jam spertis la malabundon de legantoj, kiel oni povas konstati per la averto surkovrila:

*Paperas senatende kaj senatente,
Esperante kaj esperante esti legata*



Klopodo Eldona

La unuaj numeroj de la revuo, kun kelkaj esceptoj, estis simpla multobligo surbaze de eltondo-muntaĵo. Sed en 1984 oni kuraĝe decidis aĉeti maŝinojn, inter kiuj kserokso-kopiilon, por mem komposti kaj presi la revuon. La ideo estis funkciigi la maŝinojn ankaŭ por eksterasocia publiko, sed eble pro manko de sperto la entrepreno ne longe daŭris.



Unua numero de La Lampiro

Tiama klopodo de presado per ŝmirulajo

Interhaltoj

La revuo spertis kelkajn haltojn, la plej longa daŭris deko da jaroj, inter la numeroj 13-a kaj 14-a. La lampireto tamen ne tute ĉesis flagreti, danke al la persistaj redaktantoj, el kiuj la plej fekundaj estas Elvira Fonte, kiu redaktis ĝin dum 6 jaroj kaj aperigis 15 numerojn; Symilde Schenk Ledon, kiu dum 18 jaroj aperigis 70 numerojn, kaj Paulo S. Viana (nuna redaktanto) kiu ekde 2016 aperigas ĝin ĉiun duan monaton, per tio enlistigante jam 63 numerojn publikigitajn.

La revuo ĉesis aperi surpapere en 2017 kaj de tiam ĝi estas legata sur-ekrane.

Poemo


Kvankam eta, La Lampiro
Sur la teron lumon ĵetas,
Same kiel la lumturo
Sur la maron ĝin formetas.

Godofredo Arajo Goes

Salvador-BA, oktobro 1960



Darcy Pedroso Machado Gaia
redaktis la revuon La Lampiro
de 1959 ĝis 1972 kun kelkaj
interhaltoj nedependaj de li.



Lingvaj Respondoj

de Francisco Wechsler



Demando

Zamenhof uzis la vorteton *ĉi anstataŭ ĉi tie*. Ĉu estas permesate uzi ĝin ankaŭ anstataŭ aliaj similaj, kiel *ĉi tiu*, *ĉi tia*, *ĉi tio* k.s.?

Respondo

Zamenhof kelkfoje uzis la vorteton *ĉi* memstare anstataŭ *ĉi tie*, kiel montras interalie la sekvantaj ekzemploj:

Ĉi ne estas akvo! (Fabeloj de Andersen 1) = *Ĉi tie ne estas akvo!*

Neniu magazeno ĉi estas! (Fabeloj de Andersen 1) = *Neniu magazeno ĉi tie estas.*

Ŝi vidis, ke la fratoj staras ĉirkaŭ ŝi brako sub brako, sed pli da loko, ol estis nepre necesa por ili kaj ŝi, ĉi ne estis. (Fabeloj de Andersen 1) = ... *ĉi tie ne estis.*

[...] ili tamen [...] pepadis, kvazaŭ ili volus ŝin konsoli: "*Ĉi ni estas, ĉi ni*

estas!" (Fabeloj de Andersen 2) = ... *ĉi tie ni estas!*

[...] jes, jes, antaŭrajdantoj ankaŭ *ĉi* estis [...] (Fabeloj de Andersen 2) = ... *ĉi tie* estis...

[...] la lampiro *ĉi* estis kaj ankaŭ lumis [...] (Fabeloj de Andersen 2) = ... *ĉi tie* estis...

Vakskandeloj do nun *ĉi* estis, [...] (Fabeloj de Andersen 2) = ... *ĉi tie* estis...

[...] kaj subite ili ekpeliĝis, kvazaŭ blovo de vento ektuŝus la akvon, sed tute ne *ĉi* estis vento, [...] (Fabeloj de Andersen 2) = ... tute ne estis *ĉi tie* vento...

*Sed la lanterno tiam sentis la plej sopiran deziron, ke **ĉi** estu ia vaksandelo, [...] (Fabeloj de Andersen 2) = ... ke **ĉi tie** estu...*

La uzado de memstara **ĉi** anstataŭ **ĉi tiu**, **ĉi tiun**, **ĉi tiuj** aŭ **ĉi tiujn** estas trovebla ĉe kelkaj aŭtoroj, sed ankoraŭ ne vaste populariĝis:

*Iel aŭ tiel, **ĉi** homoj iras, ne propravole, sed devigite. (De Diego, La inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha) = ... **ĉi tiuj** homoj...*

*Se ni lasus **ĉi** homon libere pasi, tiam lia ĵuro estus falsa [...] (Sama verko) = ... **ĉi tiun** homon...*

*[...] por aferoj koneksaj kun li, venis **ĉi** alia sinjoro [...] (Sama verko) = ... **ĉi tiu** alia sinjoro...*

Fine, ne eblas uzi memstaran **ĉi** anstataŭ **ĉi tio(n)**, **ĉi tia(j)(n)**, **ĉi tiel**, **ĉi tiam** aŭ **ĉi ties**, ĉar la signifo de tiaj esprimoj estus malklara.

Nia amika bestlibro

Luiz Cláudio el Lorena

Kolorigota libro

lanĉota okaze de la 18-a
E-Kongreso de Ŝtato Sanpaŭlo



Sen amo, mi estas nenio, mi scias nenion

Milton de Paula

Mistera vorteto! Pli ofta ol la aero, kiun ni spiras, pli abunda ol la akvo en la tuta oceano. Tiel necesa kiel la vivo mem kaj tiel sekreta kiel tio, kio kuŝas en la koro de homoj. Ami estas kondiĉo por supervivo, kondiĉo por saĝo. Neniu paŝo estas farata sen amo al io. Eĉ por dormi ekzistas kialo, eĉ se ĝi estas la simpla amo al si mem, al la propra ripozo, al la reakiro de siaj fortoj. Eĉ en mallaboremo oni amas sin mem, kiom ajn mallerta tiu amo povas esti.

Amo estas tio, kio donas sencon. Kial (racio estas tio, kio movas, ĉu ne?) mi eliras sur la straton kaj komencas labori? Kial mi telefonas al tiu persono? Kial mi volas lerni la germanan aŭ la anglan? Kial mi aliĝas al tiu ekskurso por la sekva longa semajnfino? Ĉiuj kialoj de la vivo provas klarigi la amon, kiun mi havas, almenaŭ al mi mem. Mi zorgas pri mi mem, mi provas kontentigi miajn urĝecojn. Mi ŝatas min mem kaj mi volas esti feliĉa.

Mi iras tien kaj reen, mi marŝas kaj mi haltas, mi rapidas aŭ malrapidiĝas, ĉio por senti min bone kaj resti viva. La tuta diligenteco, kiu trabilas en miaj agoj, estas signoj de memfido, eĉ kiam mi ŝajnas deprimita aŭ, almenaŭ, senkuraĝigita. La superviva instinkto trovas sian sinonimon en amo al si mem. Mi estas tio, kio mi estas, ĉar mi amas min mem. Mi eble ŝajnas forta kaj hontas konfesi ĝin, sed estas pro tiu gesto de amo, ke mi evitas fali.

Mi povus esti negativa, trovante la malpli belan flankon de ĉiu situacio ("Ho ve, kiel ĝene, pluvas!", "Fek! Tuj kiam mi metas mian piedon sur la asfaltan, aŭto venas por igi min atendi", "El ĉiuj tagoj, alia fakturo devis alveni hodiaŭ!"), sed mia pesimismo tamen malkaŝas la deziron esti feliĉa. Ne ekzistas maniero eviti tion. Ni ĉiuj estis faritaj por esti feliĉaj. "Amo komenciĝas hejme," diras la proverbo. Aŭ, "Neniu donas tion, kion ili ne havas." Same kiel konstruaĵo estas farita el

(Daŭrigota sur paĝo 30)

En Tesaloniko, Esperanto kiel ŝlosilo de civita identeco

(Giacomo Comincini)

Dum la 7-a internacia konferenco *Crossroads of Languages and Cultures: Intersecting Epistemological Perspectives in Multilingual Education*, gastigita de la 2-a ĝis la 4-a de aprilo 2026 ĉe la Aristotela Universitato de Tesaloniko, Esperanto estis prezentita ne nur kiel komuniklingvo, sed ankaŭ kiel fundamento de ebla civita aparteno. Mi partoprenis en la konferenco kadre de la delegacio de *Kultura Centro Esperantista* (KCE), kiu jam de multaj jaroj havas intensajn kunlaborajn rilatojn kun la medio de ALTE (*Association of Language Testers in Europe*).

Mia prelego, titolita *Identity Through Language Education: The Case of The Esperanto Citizenry*, prezentis al la internacia publiko apartan kazon: tiun de la Esperanta Civito, unu el la ĉefaj realaĵoj de nia esperantista movado. Formale lanĉita en 2001 kiel konsorcio, la Civito interpretas la komunu-

mon de esperantistoj ne kiel simplan reton de parolantoj, nek nur kiel movadon, sed kiel diasporan lingvan minoritaton, kapablan esprimi instituciojn, normojn, edukajn vojojn kaj formojn de partopreno. Tiusence ĝi estas unu el la kulminoj de la raŭmisma penso-skolo.

La kerno de mia kontribuo estis la rilato inter lingva edukado kaj identeco. En la *Civito*, civitaneco ne ligiĝas al teritorio, etno aŭ nacieco, sed al konscia kultura kaj lingva elekto: tiu de homo, kiu sentas sin *esperanta civitano*. La kono de la lingvo kaj de ĝia historia-kultura tradicio do ne estas nur komunikilo surbaze de komuna lingva tereno: ĝi fariĝas enirejo al komunumo, al komuna memoro kaj al civita respondeco pri politika partopreno. Tiu koncepto estas kodigita en la Konstitucia Ĉarto de 2001 — kies dudek-kvina datreveno okazas ĝuste

ĉi-jare! — kaj en la *Lex Valeria* de 2008, kiuj difinas la esperantan civitanecon kiel libervolan kaj daŭran statuson, bazitan sur la kono de la lingvo kaj de la komunaj civitaj strukturoj.

Aparta atento estis dediĉita al la koncepto *Knowledge of Society*, esperante *kono pri socio*, kies inkludo estas konsiderata ĉiam pli grava en la lastatempa evoluo de lingvaj ekzamenoj en Eŭropo. *Knowledge of Society*, en la kazo de nia lingvo, ne estas abstrakta nocio, sed aro da konoj pri la historio, kulturo, simboloj, literaturo kaj institucia organizo de la esperantlingva komunumo. Ĝi estas centra elemento de LTSEC, la lingvotesta sistemo de la *Esperanta Civito*, kiun KCE administras nome de la tuta konsorcio. LTSEC estas nuntempe la sola pritaksa sistemo por Esperanto, kiu inkluzivas tian komponanton de “civita edukado” kaj kovras ĉiujn ses nivelojn, de A1 ĝis C2, de la referenckadro de la Konsilio de Eŭropo.

Ĝuste ĉi tie troviĝas la plej originala punkto de la kazesploro: lerni lingvon ne signifas nur akiri gramatikon kaj vortprovizon, sed ankaŭ ekrilati kun vivanta komunumo. En la kazo de Esperanto, tiu komunumo ne koincidas – kaj ne povas koincidi – kun ŝtato, nek ĝi disponas pri geografiaj land-

limoj, impostaj aparatoj aŭ teritoria trudpovo. Kaj tamen tia kolektivo povas evoluigi formon de civitaneco bazitan sur libervola aliĝo, lingva kompetento kaj kultura partopreno. La *Civito* tiel prezentiĝas kiel laboratorio de neteritoria aparteno: certe malgranda kaj ankoraŭ kreskanta, sed kun propra institucia kohero kaj klara suba politika filozofio.

Tiu perspektivo estas aparte interesa en akademia kunteksto dediĉita al multlingveco. Ofte minoritataj lingvoj estas studataj rilate al specifaj teritorioj aŭ al historie lokitaj komunumoj. Esperanto, kontraŭe, montras alian eblon, se oni rigardas ĝin tra raŭmisma lenso: tiun de disa lingva minoritato, konstruita per kulturaj ligoj, edukaj praktikoj kaj komunaj institucioj.

La prelego montris ankaŭ, kiel la sistemo de la Civito ne limiĝas al proklamado de valoroj, sed klopodas traduki ilin en procedurojn, kun ĉiuj evidentaj malfacilaĵoj renkontataj de juna realaĵo, ankoraŭ minoritata ene de la pli vasta esperantista mondo. La aliro al civitaneco okazas laŭ malcentralizita kaj federacia modelo, en kiu aliĝintaj institucioj havas la rolon atesti la lingvan kompetenton kaj la komprenon de la komunaj normoj.

Tiuj elementoj ne nur interesas lingvistojn kaj akademiulojn, sed verŝajne estas nekonataj al granda parto de la *samideanoj*.

En Tesaloniko, antaŭ vasta universitata publiko, parte ankaŭ ekstereŭropa, la prezento vekis intereson ĝuste ĉar ĝi elkondukis Esperanton el la kutimaj stereotipoj. Ne historia kurozaĵo, ne nur helplingvo, sed kultura identeco kapabla generi *sui generis* instituciojn, edukajn ilojn kaj originalan koncepton pri civitaneco. Ne-

esperantistaj esploristoj kaj fakuloj efektive montris apartan atenton al la kazo de la konsorcio, konsiderata interesa kaj el lingva kaj el institucia vidpunkto.

La *Esperanta Civito* tiel aperas kiel invito pensi pri Esperanto kiel spaco de memdeterminita respondeco, kaj pri civitaneco kiel kultura elekto eĉ antaŭ ol kiel deviga aparteno, naskiĝa heredaĵo aŭ nura administra proceduro.



Daŭrigo de la paĝo 27

El mia vidpunkto

multaj malgrandaj brikoj, tiel ankaŭ mia feliĉo kaj la feliĉo de aliaj estos la rezulto de malgrandaj agoj de pacienco, kiujn mi havas kun mi mem, de kompreno kaj bonvolemo al aliaj.

Ni povus kolekti plendojn en ĉiu areo de homa sperto, kaj ni pravus, ĉar, finfine, neniu estas perfekta. Sed ankaŭ estas vere, ke "se ĉiu balaŭs antaŭ sia propra domo, la tuta urbo estus pura." Sen amo, ni estas nenio, ĉu ne? Sed se ĉiu aldonas la spicojn de iom da amo, precipe ĝoja amo, la manĝo de la homaro estos bongusta. Krome, sen amo ni scias nenion pri la vero, ĉar ĝi estas la vera signifo de ĉiu estaĵo.

Baldaŭ lanĉota okaze de la
18-a E-Kongreso de Ŝtato Sanpaŭlo

Klara de la Anĝeloj

Lima Barreto

Tradukis: Paulo S. Viana

